2 0 -09- 1988

# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

8a jarkolekto n-ro 6
septembro 1988

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto *(verantwoordelijke uitgever)*: Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.

---

ESTRARO

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Edward Symoens, vicprez., Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, tlf. (091) 57 63 84.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, tlf. (03) 239 21 69.
Hilde van Ingelgem, grupa agado, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, tlf. (011) 52 19 43.

KOMISIONOJ

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 17 22.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.

---

FEL-ESTRARO

## RAPORTO PRI LA KUNSIDO DE 880910

### 1. Financo kaj administrado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh

1. Financoj: Ili ŝajne estas pli-malpli kontentigaj, kvamkam zorgoplenaj restas la grafikaj laboroj. Mankas laboroj, kio povus rezulti en deficito fine de la jaro. Pozitivaj estas la rezultoj de "Monato" (altiĝo de la abonantaro), "Stafeto"-libroj kaj la libroservo ĝenerale.

2. Presado: ID kontaktos esperantistan-presiston por peti lian opinion: ĉu revizii la malnovan A4-maŝinon? ĉu aĉeti brokantan A3-maŝinon? ĉu aĉeti tute novan? PP/GJ faros superrigardon de la presajoj de la lasta jaro dividita laŭ kategorioj: A4, A3 (Dia Regno ekz.), A2 (libroj, Monato, Kontakto).
ID kaj RR komune provos trovi pli da klientoj por grafika laboro. ID ankaŭ provos kapti laboron interŝanĝe kun anoncospaco ĉefe ĉe kulturaj asocioj.

3. Socia plano: Leviĝis la ideo donaci iun sumon al la oficistoj se la jaro estas finance bona. La plimulto ne deziras ligi tion al la financaj rezultoj de la jaro. PP proponas, ke anstataŭ doni gratifon, la estraro invitu la oficistojn unufoje jare al komuna manĝo. Oni revenos al tiu ideo en decembro, kiam pli klaraj estos la financaj prognozoj pri 1988.

4. Informa materialo: FEL kutimas liveri al la grupoj la du prospektojn kun respondkarto sub la kostoprezo. Tiel FEL subvencias la grupojn per ĉ. 10000 frankoj jare. Decidiĝis daŭrigi tiun kutimon tiel longe kiel finance eltenebla, por instigi al la grupoj uzi la materialon. ID proponas eĉ malaltigi la kostojn de la afiŝo. La plimulto tamen preferas resti ĉe la nuna prezo. La kompostado de la teksto por surpreso restos senkosta.

### 2. Parto ĝenerala

Ĉeestas: Ivo Durwael, Alex Humet, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh

5. Kongresoj: La estraro esprimas sian laŭdon pri tre bone sukcesinta aranĝo en Gent. Por la venonta jaro (Antverpeno) ID proponas iom alternativan kongreson: unutagan, malferman al neesperantista publiko, kun la nederlanda kaj Esperanto kiel laborlingvoj, eventuale kune kun alia (ne-esperantista) organizaĵo.

6. Nova prezidanto: En aprilo 1989 ID devos laŭstatute abdiki kiel prezidanto de FEL. La estraranoj estas petataj iom sondi ĉe ĉiuj eblaj kandidatoj.

7. Estraraj taskoj: HvI respondecos pri rondvojaĝoj de prelegantoj. Cirkuleroj pri tio tamen prizorgos alia estrarano. JV provizore ne prenas specifan taskon pro tempomanko.

8. Militrifuzantoj: En Esperanto-Panorama denove aperu teksteto kiu anoncas ke militrifuzantoj povas fari sian civilservon ĉe FEL.

9. Programoj de VSDC: Aldone al la protokolo aperas listo de staĝoj kiuj estas interesaj por gvidantoj de Esperanto-grupoj. Interesitoj povas enskribiĝi por tiuj staĝoj pere de FEL.

10. Strategia kunsido de oktobro: Dum tiu kunsido kelkaj (neesperantistaj) specialistoj difinos kun ni la celgrupo(j)n de nia agado en la venontaj jaroj, kaj komentos kelkajn konkretajn planojn. Ĉiu grupo delegu unu-du homojn al tiu laborkunveno. La administrantoj de FEL kaj estraranoj de la grupoj cetere ricevos ankoraŭ personan inviton.

11. Donacaj kartoj: FEL havas nun siajn donacajn kartojn. Kiu ajn povas aĉeti ilin. La valoro de la donaca karto povas esti kiom ajn granda. Ili estas interŝanĝeblaj kontraŭ Esperanto-libroj (propraj de FEL kaj aliaj), Esperanto-diskoj kaj abonoj de "Monato".

12. Sonorilo: Ni rimarkas, ke daŭre Sonorilo aperigas anoncetojn pri Esperanto en la gazetoj. En ili troviĝas ilia adreso kiel nura kie interesitoj povas peti informojn pri Esperanto. La nomoj de la informpetintoj neniam estas transdonitaj al FEL aŭ al lokaj grupoj malgraŭ la fakto, ke ekzistas kontrakto inter FEL kaj Sonorilo kiu mencias, ke Sonorilo estas nura libroservo, kaj ne informejo pri Esperanto. Krome FEL konstatas ke denove ĉi-jare Sonorilo ne okazigis jarkunsidon kaj ne prezentis iujn ajn financajn ciferojn pri la pasinta jaro. La estraro de FEL tamen decidas momente ne perdi energion pri tiu problemo.

13. Monda Turismo: Kvankam FEL ne apartenas al "Monda Turismo", ID ĉeestos ĝian kunsidon en oktobro.

14. Eldonado: La estraro decidas ne aĉeti la kompletan stokon de la eldonejo Gabrielli, ĉar la investenda sumo estas tro granda. - Al la duopo kiu decidas pri la aperigo de libroj (Chris Declerck, Paul Peeraerts) aldoniĝas tria: Alex Humet. - La vendo de niaj propraj libroj evoluas kontentige, escepte de "Kazinski" kaj "Mondmilito" kiuj ambaŭ restas forte sub la atendoj.

15. Venontaj kunsidoj: Oktobro: tago decidota. Decembro: 3a de dec. anst. 10a de dec.

Aldono al la protololo de la FEL-estraro (p. 2 kaj 3).
Se vi interesiĝas pri unu el la kursoj, bv. kontakti
la oficejon de FEL.

1. In **ANTWERPEN** (Acebe - Lange Leemstraat)

O - CREATIEF DENKEN
- Docente : Selma Vallaeys
- 6 donderdagavonden van 19 tot 22 uur op 22/9 - 29/9 - 6/10 - 13/10 - 20/10 - 27/10
- Deelname in de kosten : 3.600 fr.

O - TIME MANAGEMENT
- Docent : Jan Dehouck
- 3 maandagavonden van 19 tot 22 uur op 14/11 - 21/11 - 28/11
- Deelname in de kosten : 1.800 fr.

O - MANAGEMENT IN DE NOT-FOR-PROFIT SECTOR
- Docent : Jean-Pierre Tanghe
- 4 donderdagavonden van 19 tot 22 uur op 17/11 - 24/11 - 1/12 - 8/12
- Deelname in de kosten : 2.400 fr.

2. In **OOSTENDE** (De Ploate - Langestraat 82)

O - VAN MARGARINEDOOS TOT DUBBEL BOEKHOUDEN
- Docent : Michel Piers
- 8 donderdagavonden van 19 tot 22 uur op 29/9 - 6/10 - 13/10 - 20/10 - 27/10 - 10/11 - 17/11 - 24/11
- Deelname in de kosten : 4.000 fr.

O - TIME MANAGEMENT
- Docent : Jan Dehouck
- 3 donderdagavonden van 19 tot 22 uur op 1/12 - 8/12 - 15/12
- Deelname in de kosten : 1.800 fr.

3. In **GENT** (Hotel Climat - Ottergemsesteenweg 703)

O - VZW IN PRAKTIJK
- Docent : Roland Van Hecke
- 4 dinsdagavonden van 19 tot 22 uur op 27/9 - 4/10 - 11/10 - 18/10
- Deelname in de kosten : 2.400 fr.

O - TIME-MANAGEMENT
- Docent : Jan Dehouck
- 3 maandagavonden van 19 tot 22 uur op 10/10 - 17/10 - 24/10
- Deelname in de kosten : 1.800 fr.

O - DE VZW ALS WERKGEVER
- Docent Steven Deruwe
- 1 donderdagavond van 19 tot 22 uur op 10/11/88
- Deelname in de kosten : 600 fr.

4. In **BRUSSEL** (Ufsal - Vrijheidslaan 17 - Koekelberg)

O - MANAGEMENT IN DE NOT-FOR-PROFIT SECTOR
- Docent : Jean-Pierre Tanghe
- 4 dinsdagavonden van 19 tot 22 uur op 4/10 - 11/10 - 18/10 - 25/10
- Deelname in de kosten : 2.400 fr.

O - CREATIEF DENKEN
- Docente : Selma Vallaeys.
- 6 maandagavonden van 19 tot 22 uur op 7/11 - 14/11 - 21/11 - 28/11 - 5/12 - 19/12
- Deelname in de kosten : 3.600 fr.

O - DE VZW ALS WERKGEVER
- Docent : Steven Deruwe
- 1 dinsdagavond van 19 tot 22 uur op 22/11
- Deelname in de kosten : 750 fr.

5. In **HASSELT** (Cultureel Centrum - Kunstlaan 5)

O - JURIDISCHE ASPEKTEN VAN DE VZW
- Docent : Alain Vannieuwenburg
- 3 dinsdagavonden van 19 tot 22 uur op 8/11 - 15/11 - 22/11
- Deelname in de kosten : 1.800 fr.

6. In **MECHELEN** (Centrum voor Middenstandsopl. - Oude Baan 2 - Industriepark-Noord)

O - JURIDISCHE ASPECTEN VAN DE VZW
- Docent : Alain Vannieuwenburg
- 3 donderdagavonden van 19 tot 22 uur op 6/10 - 13/10 - 20/10
- Deelname in de kosten : 1.800 fr.

7. In **LEUVEN** (Vormingscentrum CMO - Industriepark Haasrode - Geldenaaksebaan 327)

O - JURIDISCHE ASPECTEN VAN DE VZW
- Docent : Alain Vannieuwenburg
- 3 dinsdagavonden van 19 tot 22 uur op 29/11 - 5/12 - 12/12
- Deelname in de kosten : 1.800 fr.

8. In **LOKEREN** (PB-Hotel - Dijkstraat 9)

O - DE VZW IN PRAKTIJK
- Docent : Roland Van Hecke
- 4 dinsdagavonden van 19 tot 22 uur op 8/11 - 15/11 - 22/11 - 29/11
- Deelname in de kosten : 2.400 fr.

O - DE VZW ALS WERKGEVER
- Docent : Steven Deruwe
- 1 dinsdagavond van 19 tot 22 uur op 6/12
- Deelname in de kosten : 750 fr.

# PLI BONE AŬSKULTI

La usona psikologo, Dro Thomas Gordon, kreis tre simplan metodon por akiri pli bonan komprenon kaj pli intiman rilaton kun alia persono.

Unua gravaĵo estas difini ĉu problemo, kiu leviĝas, estiĝis ĉe mi aŭ ĉe alia persono. Problemo de la alia povus esti: ke li (aŭ ŝi) malbone dormis, ke li estas malsana, ke li ne povas toleri la konduton de miaj infanoj, ke li malfeliĉas en sia laboro, ke li bezonas homon por paroli, ke li timas ke la edzino elspezas tro multe, ke li sentas frustacion, sed ne kuraĝas diri sian opinion, ke li estas laca, sed ne permesas al si ripozi, ktp. ktp. Problemoj de mi povus esti: ke mi ricevas gaston en momento kiam mi estas laca, ke mi ne ŝatas aŭdi la muzikon de mia najbaro, ke mi ne trovas gladitan ĉemizon kiam mi bezonas gin, ke mia ĉefo estas malgentila, ke mi opinias, ke mia edzino tro multon permesas al niaj infanoj ktp. ktp.
Tiu analizo estas jam tre grava. Multaj konfliktoj estiĝas guste ĉar ni atendas la solvon de konflikto ĉe alia persono, kiam ĝi troviĝas ĉe ni. Imagu foje, ke vi troviĝas en domo kun kriantaj infanoj. Vi fariĝas nervoza sed la aliaj plenkreskuloj ŝajne ne sentas ĝenon de tiu bruo. En tia kazo estas sencensa por koleri kontraŭ la aliaj, car ili hazarde toleras kion vi ne toleras! Sed ĉu ankaŭ vi jam spertis la scenon de edzo kun ruĝa kapo, kiu krias al sia edzino: "Finfine silentigu tiujn infanojn. Ho, ili estas malbonedukitaj!"
Post iom da atento por distingi ĉu problemo estas mia aŭ de alia persono, facile eltroveblas ke la problemo Esperanto estas MIA. Mi ŝatus konvinki aliajn homojn pri la avantaĝoj de Esperanto, mi ŝatus ke la movado disvastiĝu, mi ŝatus akiri pli da rekono, sed la aliaj ne sentas la preman bezonon de mia solvo por siaj problemoj. Ni estu konsciaj, ke ni volas vendi ideon, kiujn la aliaj ne bezonas. Tio ne devas malesperigi nin. Antaŭ kvindek jaroj la aliaj certe ankaŭ ne sentis bezonon je kolortelevizio, je televidregistrilo, je tiom da modernaj eltrovaĵoj. Tiu konstato jes signifas, ke mi devas traduki "mian" Esperanton en konkretan solvon de problemoj de la aliaj, kiel ekzemple solvo de lingvaj problemoj en rilatoj kun Sovet-Unio, Ĉinio, Japanio ktp.

Por bone kontentigi la bezonojn de la aliaj ankaŭ necesas tekniko por pli bone aŭskulti kion aliaj homoj deziras. Ĉu vi jam pripensis, ke lingvo estas tre kripligita esprimo de pensoj. Ni fakte tradukas niajn pensojn en lingvan kodon. Se A kaj B konversacias, A eble malbone esprimas sin, aŭ eble B malbone komprenas lin. B eble fantazias ideon kiun A tute ne volis esprimi. Kaj tiel ekestis jam tiom da malpacoj, miskomprenoj, gis kompleta rompo de rilato, nur pro erara interpretado de unu frazo. La simpla solvo de Gordon estas ekzerci sin en la postkontrolo de tio kion iu diras al vi. Tio povas esti simpla ripeto de frazo kiun iu diras al vi aŭ - pli bone - esprimo per viaj propraj vortoj de la ideo kiun vi aŭdis. Jen kelkaj ekzemploj:

A. "*Mi estas hasta.*"
B. "*Ĉu vi havas tiom da aferoj por fari?*"

A. "*Kial vi volas forigi la verdan stelon?*"
B. "*Ĉu mi bone komprenis ke vi pli ŝatas la verdan stelon ol la jubilean simbolon?*"

La rezulto de tiaj simplaj kontrolaj demandoj estas surprizaj. La persono kun kiu vi parolas sentas ke vi komprenas lin (aŭ NE komprenas lin). Ĉiukaze li spertas aktivan interesiĝon kaj certe donos pliajn klarigojn aŭ korektos vian komprenon pri lia ideo. Plie, persono kiu spertis tian malfermitecon pli kaj pli malfermos sin por viaj ideoj, eĉ se ili montrtriĝas poste kontraŭaj. Tiel formiĝas iom post iom vera intersanĝo de ideoj aŭ fruktedona diskuto. Ĝi estas nekomparebla kun la oftegaj senelirаj diskutadoj de homoj kiuj daŭre alportas argumentojn, sed jam anticipe decidis neniam konvinkiĝi pri la starpunkto de la kontraŭulo. Kaj la reciproka pliriĉiĝo estas ankaŭ unu el la elementoj de la interna ideo de Esperanto, cu ne!

La tekniko de Gordon estas tre simpla. Nur la apliko bezonas iom da koncentriĝo dum ordinara konversacio por konscie sekvi la evoluon. Sed la rezultoj pravigas iom da atentostreĉo.

Ivo Durwael.

Malferma estrarkunsido de FLEJA je 27/8/88 dum FEL-kongreso en Gent.

Ĉeestantoj: Peter Ameye, Patrick Haerick, Willem Rasschaert, André Ruysschaert, Wim Tytgat kaj Jean Pierre VandenDaele.

Komenco: ĉ. 12h45 tagmanĝe

1. Interŝanĝoj kun Jugoslavoj:
tute mirige LKK-anino de la zagreba IJK proponis ke tri belgoj partoprenu ĉi tiun kongreson interŝanĝe kun venintaj jugoslavoj. Temas pri Peter Ameye, Mari-Roza De Wolf kaj Jean Pierre VandenDaele. Ni akceptis la proponon kaj tiel laŭ antaŭa interkonsento ĉi tiuj tri personoj pagos al FLEJA 3500 frankojn (tio estas 500 frankoj potage) kiam la repagon alvenos.
Kiam antaŭ novjaro tiu ĉi repago ne jam efektiviĝas, tiam Jean Pierre skribos leteron al TEJO kaj al Zagrebo por peti pri ĝia evoluo.

2. Kasisto:
Laborcele Wim devos iri al Britio jarfine kaj tial ne plu povos plenumi la taskon kasistan. Posttagmeza esplorado rezultigis la pretecon de Ana Alberto por transpreni tiun ĉi taskon. Wim sciigos al Ana pri ĝia konsisto tiel ke ŝi povos sin orienti.

3. Kursotago en Bruĝo:
je la 1a de oktobro FLEJA organizos specialan kursotagon en Bruĝo por progresantaj kursanoj. Jean Pierre sendos la invitleteron de André al ĉiuj FLEJA-anoj, FEL-grupoj kaj al informpetintoj ĉijaraj loĝantaj en la regiono de Bruĝo. Vojaĝkostoj estos repagitaj laŭ la antaŭvidita regularo de '82.
La kursgvidantoj estas Desiree Derksen, Patrick Haerick kaj Kiki Tytgat.

4. FLEJA-semajnfino:
Patrick jam skizis la preparojn por nia semajnfino en Westmalle, okazonta fine de oktobro. Antaŭviditaj estas vidbendaj filmoj, diversaj ludoj, dam- kaj ŝakkonkursoj, laborgrupoj pri moderna kaj popoldancoj, eventuale ankaŭ klakdancado kaj prelegoj pri la temo, inter alie fare de Angelos Tsirimokos. Ankaŭ ĉi-jare eblos partopreni sabatan programon pere de unutaga bileto kontraŭ la sumo de 420 frankoj.

5. Estraro:
Ŝus aperis en la ŝtatgazeto de 1/9/88 la nuna administrantaro de FLEJA sub numero 12506.

Fino: ĉ. 13h45.

Protokolanto: Jean Pierre VandenDaele.

## REGULARO pri FIKSDATAJ MONDEPONOJ

1. Flandra Esperanto-Ligo akceptas fiksdatajn deponojn por almenaŭ du jaroj. Enpagoj, elpagoj kaj transpagoj estas notitaj en personaj kontoj ĉe la sidejo de Flandra Esperanto-Ligo. Nur la kvitancoj pri tiuj sumoj kaj la kontoj de la Ligo estas pruviloj por la deponoj.
2. La minimuma deponebla sumo estas 5 000 belgaj frankoj (aŭ egalvaloro). Se la depono okazis al konto de Flandra Esperanto-Ligo pere de banko aŭ poŝto, ties pruvilo validas kiel kvitanco; se la depono okazis en la sidejo de la Ligo, ĉu per transpago, ĉu per kontanta mono, la kvitanco validas nur se ĝi estas subskribita de la direktoro aŭ estrarano pri financoj de Flandra Esperanto-Ligo.
3. Deponfino okazas nur se Flandra Esperanto-Ligo ricevas antaŭ la fino de la dua jaro skribitan averton. Sen averto flanke de la deponinto, la depono aŭtomate pludaŭras du pliajn jarojn.
4. Elpagoj post deponfino okazos tuj por maksimumo de 20 000 belgaj frankoj. Se la petita sumo superas 20 000 frankojn, ĝi estas pagata en partoj de maksimume po 20 000 frankoj ĉiun monaton. Tiu ĉi regulo ne validas por pagoj al Flandra Esperanto-Ligo mem.
5. La rento estas fiksita je 6% kaj restas sen ŝanĝo ĝis aperas publika avizo en la periodaĵoj de FEL: *Esperanto Panorama* kaj *Monato*. La rento kalkuliĝas por tuta periodo de unu jaro, ekde la unua tago de l' monato sekvanta post tiu de la depono.
6. La rento estas pagata post ĉiu periodo de unu tuta jaro. Peto por elpago de la depono aŭ parto de ĝi antaŭ la deponfino, aŭtomate kaŭzas nuligon de la rento de la kuranta jaro, rilate al la sumo elpagita. Se validas paragrafo 4, estas kalkulata rento por ĉiu monato post la fino de la minimuma deponperiodo.
7. La kalkulita rento estas adiciata al la deponita sumo. La ŝparanto povas ankaŭ ricevi la jaran renton post simpla peto.

esperanto

# la verda konto



# Ĉu ankaŭ vi iĝos verda ŝparanto?

Efektive, ekde nun vi povas investi vian ŝparmonon ankaŭ ĉe Flandra Esperanto-Ligo. Kiel vi procedu?
Se vi havas iom da ŝparita mono, ni diru 5 000 belgajn frankojn (ĉirkaŭ 275 nederlandaj guldenoj, 240 germanaj markoj, 150 usonaj dolaroj, 850 francaj frankoj...) vi ĝiru ĝin al unu el la kontoj de Flandra Esperanto-Ligo* kun la informo "ŝparmono". Nenion plu vi bezonas fari. Vi ne bezonas iri al poŝtoficejo aŭ banko ĉiumomente, vi ne bezonas tranĉi kuponojn por enkasigi la rentojn, kalkuli la interezojn... Ĉion por vi faros Flandra Esperanto-Ligo, senpage. 6%** da rento aŭtomate adiciiĝos ĉiujare al la investo tiel ke ankaŭ ĝi siavice donas renton.
Certe ankaŭ gravas por vi scii, kion ni faras per via mono. Tio ne estas sekreto. Ĝi estas uzata por subteni projektojn kiuj antaŭenigas Esperanton, por eldoni librojn, investi en maŝinoj ktp. Vi ricevas belan renton, kaj samtempe subtenas la Esperanto-movadon! Duflanka profito!

Ĝiru tuj! Venontjare vi riĉe rikoltos...

* Poŝtĉekkonto de Flandra Esperanto-Ligo: 000-0265338-43. Indas unue informpeti ĉe FEL kiu pagmaniero estas la plej malmultekosta!

** Enloĝantoj de Belgio devas parton de tiu rento plupagi al la impostoj.